Eltuniziaj kronikoj (3)

Sidi Bouzid y Redeyef: ĉe la koro de la revolucio

Sidi Bouzid, 50.000 loĝantoj, ĉefurbo de provinco el 450.000 loĝantoj ĉe la centro-sudo de Tunizio. 70% el la loĝantaro sin dediĉas al la agrikulturo kaj la bredado. Tie buĉoferis sin je la 17a de decembro la senlaborulo Mohamed Bouazizi, nun fariĝinta bildo por la dignorevolucio.

Tunizianoj, restu surpiede. La tuta mondo fieras pri vi

Ĉe la sidejo de la TĜUL (Tunizia Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj) ni renkontis la komitaton pri savo de la revolucio. Ekde la 14a de januaro, dato de la falo de Ben Ali, pluraj organizoj starigis tiun ĉi komitaton kun du klaraj celoj: defendi la revoluciajn konkerojn kaj pliampleksigi, disvolvi ilin.

El la komitato de Sidi Bouzid oni instigis kaj partoprenis la koncentriĝojn de la Kasbaho 1a kaj Kasbaho 2a, kiuj atingis faligi la Ghanouchian registaron, kiu reprezentis la daŭrecon de Ben Ali kaj ties partio, la RCD.

Oni firme eltenas la postulaĵon pri la dissolviĝo de la politika polico de la diktatorado, pri la publikigo de ĝiaj sekretaj dosieroj kaj pri la malkovron de la diversaj po-

Momumento omaĝe al Mohamed Bouazizi

lictipoj, kiuj estis kreitaj (oni konas spurojn pri la ekzisto de ĝis 6 tipoj de policoj, iuj el ili plene sekretaj). Kaj aldone al tio pri la aresto kaj juĝado de la responsuloj pri la murdoj de manifestaciantoj kaj pri la koruptado, la rabado kaj la detruado de la lando.

La registaro de Béji Caid Sebsi daŭre eltenas la nepunecon por la maŝinaro de Ben Ali. Oni liberigis la politikajn prizonulojn, oni anstataŭigis guberni- kaj policestrojn, oni dissolvigis la RCDon, sed la murdoresponsuloj ne eniris en prizonon. Multaj guberniestroj estas eksaj aktivuloj de la RCD kaj tiu ĉi estas kaŝita en 5 aŭ 6 laŭleĝigitaj partioj.

Neniun fidon al tiu registaro. Ĝis nun neniun ekonomian ŝanĝon, kiu povas profiti la popolon. La senlaboro daŭras same kaj la bildoj pri la koruptado restas. La ĵurnalaro kaj la TV ŝanĝis stilon sed ili daŭras esti regataj.

Ankaŭ ĉe Sidi Bouzid la municipa konsilio estas dissolviĝinta kaj la komitato pri savo de la revolucio proponis la homojn por konsistigi ĝin. Sed oni ne donas budĝeton al ĝi, oni haltigas kiun ajn agadon. La povo ne forgesis la rolon de Sidi Bouzid en la revolucio kaj klopodas puni ĝin.

Sed ĉe Sidi Bouzid, kiel ĉe plejparto el Tunizio, tio plej grava estas la procesoj de popola memorganizado

Jam estas kreita pretiga komitato por la starigado de kamparana sindikato, kiu defendu memstare iliajn interesojn, la senlaboraj gediplomatuloj ankaŭ organiziĝis kaj eltenas postulantan tendaron kun unu tendo ĉe la urbocentro kaj oni pretigas la Kasbahon 3an por daŭre puŝi por la neatingitaj postulaĵoj kaj esprimonte la rifuzon al la nuna registaro.

Kunveno kun la komitato de Sidi Bouzid

Kaj antaŭ ĉio la etoso de debato, de diskuto, de lernovolo. Ili scias pri la manko de sindikata trejnado, pri la bezono krei novan kulturon, novan mensostaton, kiu respondu la bezonojn de la revolucia proceso. Ili ne timas la radikalan islamismon, ĉar ili pensas, ke la tunezia islamo estis ĉiam tolerema kaj respektema

antaŭ la plureco.

Redeyef: mineja baseno de Gafsa, proksima antaŭaĵo de la revolucio.

La spontaneco de la tunizia revolucia proceso estas pli ŝajna ol reala. Estis multaj jaroj de semado, de spertoamasiga proceso, de luktoj, de subpremadoj kaŝitaj, sed kiuj ade kreas profundajn radikojn, kiuj je iuj cirkonstancoj ĝermas kaj evidentiĝas.

Kamaradinoj Meryem kaj Milouda

Tiu ĉi estas la okazo de Redeyef, kiu jam travivis popolan ribelon je la 2008a, krude subpremita, sed kiu estis la aŭguro pri la nuna revolucia proceso.

Ĉe la simpla sidejo de la TĜUL ni trovis la grandajn brakseĝojn de la sidejo de la Ben Alia partio, kiuj estis konfiskitaj de la popolo. Iamaj ministaj malliberuloj kaŭze de la ribelo kontraŭ la restrukturigo de la minoj kaj la senlaboreco (ĉe tiu ĉi regiono la nursolaj laborlokoj esta la CPG, la Kompanio pri Fosfatoj de Gafsa, kaj vivtenada agrikulturo sur tre senfrukta kaj malriĉa grundo) akceptas nin kune kun la surloka komitato de la senlaboraj gediplomatuloj kaj la unua “blogisto” de la revolucio.

9 homoj administras la vivon de la urbo, 7 viroj kaj 2 virinoj. Tio estas provizora kaj volonta kaj la liston oni sendis al la guberniestro.

La senlaboraj gediplomatuloj parolis al ni pri sia lukto ekde la 2004a, kiam ili ekorganiziĝis malgraŭ la subpremado. Estas ĉ. 3.000 senlaboraj gediplomatuloj ĉe la provinco Gafsa. Ili pretiĝas premi la registaron kaj organiziĝas ĉe la tuta Tunizio. La komitaton konsistigas 4 viroj kaj 4 virinoj.

Kun la komitato de Redeyef

La virino pergajnis surstrate sian fundamentan rolon en la lukto. Je la 2008a surstratiĝis manifestacio preskaŭ nur el virinoj, iuj el ili kun ŝiaj filoj ĉebrake, por esprimi la solidarecon al la ministoj de la Gafsaa baseno. La sovaĝa polica subpremo, kiun ili suferis, okazigis la ribelojn de Gafsa, kiuj daŭris pluraj monatoj.

La komitato pri savo de la revolucio

presentis dosieraron kun ĉio, kio okazis je la 2008a, kun konkretaj denoncoj, nomoj kaj familinomoj de la responsuloj pri la mortoj kaj la torturoj. Ili ne forgesas tiu dosieraron, al kiu ili aldonas unu plian: tiun pri la subpremadoj je decembro de la 2010a kaj je januaro de la 2011a.

Ĉe Redejef estis semata la revolucio per mortintoj kaj malliberuloj. Hodiaŭ ekkomencas la fruktorikolto.

M.H. kaj Mouatamid

Laborgrupo pri la Afrika Nordo de la Sekretariaro pri Internaciaj Rilatoj de la Hispana ĜKL

Secretaría de Relaciones Intenacionales de la CGT: *Crónicas desde Túnez (3)*. Rojo y Negro Digital, 10 de abril de 2011.

http://www.rojoynegro.info/articulo/sin-fronteras/cronicas-tunez-3-sidi-bouzid-redeyef-el-centro-la-revolucion

Esperantigita de Jurgo Alkasaro